

ESPERANTO

TRIUMFANTA

15. Oktobro
Jen la dato, ĝis kiam ni nepre bezonas anoncojn por la speciala numero pri
Nürnberg.

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, Barcelono
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administristoj:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtadreso: Köln 70865, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Buttin.
Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj inter la Esperantistoj de la tutmondo.

Semajna

Abonoj ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko je germana banko.

Kun senpaga monata „Revo“

La prezo de unu numero, estas por la landoj:

Aŭstra 600 Kr.	Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Germana 20 Mk.	Jugosl. 1.60 Din.	Portug. 0.50 Esk.
Belga 0.50 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	(Germanoj abonu Kanada 0.06 Dol.	Rumana 3 Lei.	
Brita 3/4 P.	Franca 0.50 Fk.	ce sia poŝtŝtelo) Nederl. 0.15 Hfl.	Sveda 0.24 Kr.	
Bulgara 3 Levaj	Hispana 0.50 Pcs.	Itala 0.70 Lir.	Norvega 0.30 Kr.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hungara 20 Kr.	Japana 0.10 Jen.	Pola 80 Mk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Baltikanoj kaj rusoj demandu la prezon de sia Abono. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Neŭtrala

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4
Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj.
Anoncoj kostas po cm² 0.10 svizan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 15 gmk); rabato laŭ interkonsento.

Numero 105 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 8. Oktobro 1922.

Brazila Registaro subvencias.

La Brazila Parlamento voĉdonis subvencion de 1500 milreĵoj (ĉ. 1000 svizaj frankoj) al Brazila Esperantista Ligo, jam rekonita kiel societo de publika utileco laŭ dekreto n-o 4356 de 26. de Oktobro 1921.

Ĉi tiu ĝojiga sciigo, kiu ĵus atingas nin el Rio de Janeiro, denove pruvas la grandan favoron, kiun la brazila registaro montras al nia movado. Sed ĝi kontrastas tre strange al la paroloj de la brazila reprezentanto en la 5 Komisiono de la Ligo de Nacioj. Dum la brazila parlamento voĉdonas subvencion al la Brazila Esperantista Ligo, la brazila delegacio oficiale kontraŭparolas Esperanton en Genève asertante, ke Esperanto estas „dangera utopio“. Kvankam la brazila reprezentanto eble persone malsimpatias nian movadon, li devis, sciante jam depost unu jaro, ke oni traktos la demandon pri Esperanto, informi sin pri nia movado. Tion li evidente ne faris. Alie li sciis, kio okazas en lia lando. Ni miras, ke li krom tio laŭŝajne ne petis instrukciojn de sia registaro.

Ke la intereso por nia movado estas en Brazilujo multe pli vigla kaj ĝenerala ol s-o de Rio Branco asertas, kaj ke Esperanto ekzistas ne nur en la „duaranga ŝtato“ Sergipe, tion niaj legantoj ja scias, kiuj vidis nian specialan n-on por la Jubilea Ekspozicio en Rio de Janeiro eldonitan laŭ iniciato kaj helpo de la Ekspozicia Komitato.

Antaŭ la Forumo de l' Mondo.

Trafe diris la itala Senato Sciajola: „En la momento, kiam Ligo de Nacioj ekokupas sin pri iu afero, ĝi ne estas plu afero de unuopuloj, sed ĝi troviĝas antaŭ la Forumo de l' mondo.“

Samo koncernas la mondhelpingvon Esperanto. Kvankam la franca delegitaro ricevis severan ordonon kontraŭbatali Esperanton, la franca Senato Reynald ne kuraĝis prezenti al la mondo spektaklon, kiu alportus al Francujo duban honoron. S-o Reynald estas delikatsenta psikologo. Li anstataŭe sendis en la batalon preteman amikon, kiu tre kompromitis sian registaron: la brazila delegito. Tiu ĉi faris la konatan paralelon inter Esperanto kaj komunismo kaj aliaj mistikaj aferoj; ja, por kolumnii Esperanton, li eĉ humiligis sian propran landon, nomante la ŝtaton Sergipe, kiu enkondukis Esperanton en la lernejojn, ŝtato duaranga! La brazilo do vere havis malmulte da kaŭzoj paroli pri la fanatiko kaj troferovo de la Esperantistoj. Ke lia propra registaro, nome la Oficejo por Eksterlandaj Aferoj, uzas Esperanton praktike (okaze de l' festo de centjara sendependeco de Brazilo), ke en Rio de Janeiro oni in-

struas Esperanton en kelkaj lernejoj, ke la parlamento nomis la Esperanto-Asociacion „societo de publika utilo“, kaj ke en Brazilo ekzistas leĝoj, kiuj favoras Esperanton en la administracio... pri tio ĉi la oficiala reprezentanto de Brazilo scias nenion aŭ ne volis ĝin scii. Oni povas esti scivola, kion diros lia registaro pri tio...

Sed noble kondukis la franca reprezentanto, kiu nepre rekonis la sincerecon de la Esperantistoj kaj konstatis, ke la decido de la Pariza komerca ĉambro, favore donita al Esperanto, jam portas bonajn fruktojn. Li estas prava, ĉar pli ol dudeko de komercaj ĉambroj de lia lando aliĝis al nia movado, kaj la foiroj de Lyon, Paris kaj Bordeaux uzas la helplingvon praktike en eksterlandaj rilatoj. Pri la sensacia ĉirkulero de la ministro Bérard li tute silentis. Ĉu pro honto? Ĉu la mondkonscienco de Ligo de Nacioj, pri kiu eminenta diplomato parolis, malhelpis lin permesi, ke la akra taglumo de la Ligo lumigis ĉi tiun malluman punkton de franca politiko?

Bonege defendis Esperanton la japanoj, ĉinoj, persoj, bulgarioj kaj finnlandanoj. La registaroj de ĉi tiuj landoj transdonigis rezoluciojn, kiuj tre

postulas nia kara Esperanto, oferojn, kiujn oni voleme faras por ĝi, mi meditis. Eĉ la familia vivo suferas pro tio. Jam la tutan tagon forestis mia edzino kaŭze de l' kongreso. Preskaŭ tro ofte tia disigo okazas; aŭ mia edzino estas partoprenanta Esp. kongreson aŭ mi mem; la grandajn monelspezojn mi eĉ ne kalkulas.

Sed kiel pasigi la tempon? Nu, por ion fari, mi finis la korespondadojn kun miaj samideanoj, skribis ilustritan karton al ĉi tiu, migrantan karton al tiu, karton „bfl“ al alia. Poste mi okupis min dum iom da tempo je miaj kolektajoj. Kun fero mi rigardis kaj trafiliis miajn poŝtkartoj kaj poŝtmark-albumojn, kiujn pli ol unu el miaj „samideanoj“ envias al mi; kaj ĉi tiun sukceson mi ŝuldas nur al nia Esperanto.

Sed jen, mi ja ankoraŭ ne legis la alvenintajn poŝtendaĵojn! Kiaj novaĵoj?

Unue: Ho, oni petas min fari paroladon en la kongreso de Esperantistaj policanoj? Ne, mi bedaŭras, ĉu mi eble estas policisto? Kaj jen: invito al la laborista kongreso! Ne koncernas min, mi ja estas komercisto! Ni pluriĝardu! Ĉu plia alkonvencio? Fakte, kaj eĉ al la kongreso de amantoj de Esperantistaj hundoj! — ne, mi eraris, jen estis skribite: kongreso de Esperantistaj hundamantoj. Ĉar mi estas fervora hundamanto, ĉi tiu kongreso ekstreme interesas min. Kie ĝi okazos? En Y? Tiel malproksime! Tre multe da mono mi elspezus, sed estas ne grave, mi partoprenos. Kaj la lasta letero? „Subvencipeto por niaj blindaj Esperantistoj.“ Ja, bedaŭrindaj homoj, la blinduloj; ili nepre estas subvencindaj. Sed por mi... mi ne scias... oni tro ofte estas ĝenata per tiaj petoj ankaŭ flanke de samideanoj. Sufiĉas por mi, ke mi per la partopreno de multe-kostaj kongresoj kunhelpas atingi la altajn celojn



Efika propagando por Esperanto de la Esp. grupo „La Tagigo“ en Ledeberg apud Gent, Belgujo. (Legu la artikolon sur paĝo 2)

Apud la veturilo de dekstre al maldekstre: s-o L. Varendanck, honorprezidanto, f-ino Cor. Baert, sekretariino; malantaŭ la infanoj: f-ino Baert, s-o R. Anthoenis kaj s-o J. Terryn; flanke de la veturigisto: f-ino J. Terryn, vicprezidantino.

energie postulis tujan enkondukon de Esperanto en la lernejojn de ĉiuj landoj.

Ankaŭ la ĝenerala subsekretario de la Ligo de Nacioj, la japano D-ro Inazo Nitobe, parolis. Li deklaris, ke la ampleksa raporto de la sekretario pri Esperanto bazas sur internacia enketo, al kiu ankaŭ multnombraj registaroj kaj ceteraj oficejoj liveris valorajn dokumentojn. Ĉi tiu raporto, kiu tute senpartie estis elaborita, venas al fina konkludo, ke sole Esperanto estas konsiderinda kiel helplingvo. Al tiu sama rezultato venas ankaŭ la raportanto de la Komisiono, s-o Gilbert Murray, la konata profesoro de greka lingvo en la universitato de Oxford.

La Komisiono fine unuvoĉe akceptis la raporton de la sekretario post malgrava ŝanĝo kaj kompletigo. Al ĝi oni aldonas la gravan memorialon de la brita Ministerio por Instruado kaj la tre favoran raporton de la Pariza komerca ĉambro.

Kio koncernas la demandojn, kiuj rilatas al la ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn, ili estos transdonataj al la Komisiono por Komuna Spiritlaboro. Tiel Esperanto venas antaŭ la plej altan sciancan kompetentularon de la estanteco: Einstein, Bergson, Gilbert Murray kaj aliaj gvidantoj de l' spirita mondvido nun parolos. Kion Gilbert Murray diras, jam estas konata el la komisionaj kunsidoj: „Kiel filologo mi admiras la konstruon de Esperanto.“ —ng—

Nokta Vizito.

Kara s-o redaktoro!

Ne koleru, ke mi kuraĝas ĝeni vian felletonan moŝton per la rakonto de l' sekvanta travivaĵo.

„Do ĝis revido, mia karulo,“ diris mia edzino, „ne tro enuu kaj ne malpacienca, ĝis kiam mi revenos, kaj ne restu tro longe maldorma.“

„Trankviliĝu, kara edzino. Mi deziras al vi multe da plezuro dum la festkunsido kaj bonan sukceson. Sed ĉu vi havas vian kongreskarton?“

„Ne, fakte mi estus forgesinta ĝin.“

„Kiel ĉiufoje. Jen, sed ne perdu ĝin kiel la lasian fojon... Sed ĉi tiu ja ne estas la ĝusta, tio ja estas la aligkarton por la ĉiudonjare okazanta kongreso de Esperantistaj gimnastikunuiĝoj de virinoj... sed jen: monata kongreso de Esperantistaj urbkonsilantinoj?“

Kaj mi elprenis la karton el nia kelkcentpeca aligilaro.

„Jes, jes, donu, mi petas.“

„Jen: Vi ja bone enmemorigis vian bonvenparoladon?“

„Certe, certe, ĝi ja estas por ĉiuj kongresoj la sama. Sed ĉu vi permesas, ke mi anoncu mian partoprenon al la kongreso de Esperantistaj fromaĝkomercistedzinoj, kiu okazos la venontan semajnon en X?“

„Volonte, volontu, mi eĉ deziras tion, ĉar kiel fromaĝkomercisto mi havas nepran intereson.“

„Bone! Do ĝis revido kaj bonan nokton.“

„Ĝis baldaŭa revido.“

Ni kisis — sed ĉi tiu, kara s-o redaktoro, vi ne bezonis ekscii! — kaj mi estis sola.

Kelkajn minutojn mi paŝis en la ĉambro.

„Maloportuna vetero por iri feston,“ mi murmuris, ĉar pluvigis torento. Ja, grandajn oferojn

profesio. Ŝajnas ja, kvazaŭ Esperanto estas kreita por unuigi la homaron en unu granda rondo familia! Kaj eĉ nur unufoje en la jaro! Oni ja estos forgesinta la vizitaĵojn ĝis la venonta jaro. Ne! Ĉiu urbeto, ĉiu provinccarto kaj en ili ĉiu profesio arangu specialan kongreson kaj kiel eble plej ofte.

Mi daŭrigis la „legadon“. „Mallongaj Esp. Sciigoj.“ Kutilme mi ja ne legas ĉi tiun rubrikon, sed por pasigi la tempon mi hodiaŭ faru escepton. Cetero „mallongaj“ kun du l. Mi kredis, ke ne ekzistas en Esperanto duobla konsonanto. Nu, eble ĉi tio estas preraro.

Esperanto kaj la Instruistoj — nenio por mi; Esp. kaj la fervojistoj, Esp. kaj Ruĝa Kruco, Esp. kaj la kristanaro! Ho, la redaktoro ja kunmiksas ĉion. Ne! ET ne plaĉas plu al mi, mi malabonos ĝin. Kial ne ekzistas gazetoj pli specialigitaj? Ĉu min interesas la instruistoj, oficejoj, policanaro kip. Estas necese, ke mi pli intense okupu min pri la „gazeto de Esperantistaj fromaĝkomercistoj“, fondota de mi.

Kaj jen la redaktoro skribas: „Oni subvenciu la malsatantojn.“ Nu, mi ja volonte al ili sendus kelkajn monbiletojn, se mi ne bezonus la monon por nia ĉiita kongreso; ĉi tio estas pli grava.

Indigne mi formetis la gazeton; krom la du anoncoj ĝi ne enhavis ion interesan por mi.

Mi ekbruligis cigaron, marko „UEA“, sidigis min en mian balancan seĝon kaj revadis. Mi ne scias, krom da tempo mi tiel sidis. Subite al mi ŝajnis, kvazaŭ mi estus sentinta trablovon kaj aŭdinta la vortojn: „Bonan vesperon, sinjoro!“

Mi frotis la okulojn, sed vidis nenion krom denseta nebulo. Certe mi eraris. Sed ree: Bonan vesperon, sinjoro!“ diris tute klare tiu voĉo.

Efika propagando.

(Vidu la bildon sur paĝo 1.)

En Ledeberg apud Gent, Belgujo, okazis 6. aŭgusto 1922 „Florsekvantara Festo“, al kiu partoprenis la tuta Esp. grupo „La Tagiĝo“. La bildo montras la veturilon de la grupo kaj reprezentas la Triumfon de Esperanto. Alte sur trono sidis la Feino de Esperanto, f-ino S. Leeman, ĉirkaŭita de dek junaj gegvardistoj, vestitaj per diversnaciaj kostumoj. Estis reprezentitaj: Ĉinujo, Japanujo, Bohemujo, Italujo, Turkujo, Rusujo, Hispanujo, Skotlando, Holando kaj Usono. Dekses fraŭlinoj ĉirkaŭis la veturilon, portante girlandojn kaj kartojn kun la nomoj de la diversaj nacioj.

La tuto faris grandan impreson ĉe la publiko, kiu entuziasme aplaudis kaj laŭte laŭdis la iniciatorojn. Dua premio, sumiĝanta je 125 fk. estis aljuĝata. Certe ĝi kaŭzis multe da laciga laboro kaj sinofero, sed dank' al la sindonemo senlima de ĉiuj, oni sukcesis starigi ion indan. La Esp. kantoj ankaŭ impone impresis.

La movado en Ledeberg estas en brila stato: La komunuma estraro organizas ĉiujare du kursojn, unua- kaj duagradan, kiuj havas daŭre kreskantan sukceson.

Pioniro.

To be or not to be.

Mi sentas min tre flarita de simpatia resonado, kiun mi ekaŭdis en responda artikolo de prof. Diez en n-o 94 de ET.

Por Esperanto mi naskiĝis en la jaro de l' morto de nia neforgesebla Majstro, meze de nekonata, malproksimorienta Esperantista „bataliono“, kiu malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj laboras kaj pri venko — ne dubas. Estu permesite al mi esprimi ĉi tie por miaj kuraĝaj siberiaj amikoj-samideanoj tutan mian miron kaj ŝaton.

Mi ankaŭ memoras la rakonton el „Cuore“ de Amicis kaj ĝian finon, kie la laboristo klarigas al kuriozita gapularo, ke li estis rekonita de l' reĝo, ĉar ili ambaŭ donis sian sangon por libera, unuĝinta Italio.

Feliĉe tiom multe de ni ne postulas nia Esperanto.

* * *

Mi parolis jam pri tio, ke plej nepra nuna nia bezono estas propra libroeldonejo kaj presejo, kiu igus la pulson de nia vivo pli vigla kaj forta. Nun mi dezirus aldoni kelkajn vortojn pri la presotajtoj.

Mi esperas, ke ni ne diskutos longe pri tio, ĉu estos pli bone, unue fondi presejon, ĉu unue prepari grandan kvanton da bonaj verkoj por eldono. Mi pensas, ke ambaŭ aferoj estas same gravaj kaj samtempe devas esti efektiviĝataj. Tiamaniere personoj laborantaj sur unua kampo estos morale kaj materiale subtenataj de personoj laborantaj sur la dua kaj reciproke. Krome mi pensas, ke eĉ nun posedante la presejon ni tuj havus por ĝi multe da laboro. Sur nia librofero jam mankas materialo; ni nepre devus tuj reeldoni (sed vere malkare) la Boirac'an vortaron (eble sen franca traduko), kompletajn verkojn de Majstro, de Grabowski kaj Kabe, elektojn el artikoloj de Bourlet, Cart, Hodler, Privat kaj kelkaj aliaj.

En ĉi tiu artikolo mi ne intencas detale trakti aferon de pliritego de nia literaturo. Certe la laboro devas esti plana kaj celkonscia. Tion povus prizorgi nur Internacia Redakcia Komisiono, kiu gvidus la laborojn en ĝeneralaj trajtoj kaj donus direktivojn al Naciaj Red. Komisionoj, kiuj sole estas kompetentaj prepari la listojn de tradukotaj ĉefverkoj de respektivaj literaturoj. La teknika flanko de l' plenumo, ekzemple: ĉu la tradukoj estos araj, ĉu individuaj? — same dependas de l' lokaj kondiĉoj.

Pli intense mi rigardis, kaj nun el la nebulo malkovriĝis la korpo de viro kun griza plenbarbo, okulvitroj sur la nazo, larĝanda ĉapelo sur la kapo kaj porpluva mantelo ĉirkaŭ la ŝultroj.

„Kiamaniere vi eniris, kiu vi estas?“ mi ekparolis la fremdulon.

„Ĉu vi ne konas min?“ kaj lia mano montris al fotografajo pendanta sur la muro. Mi sekvis la direkton, rigardis denove la viron, ekmirigis kaj malproksimiĝis kelkajn paŝojn:

„Ha, la Majstro!“

„Jes, la Majstro, la fantomo de l' Majstro.“

„Kien vi iras, Majstro? De kie vi venas?“

„De kongreso mi venas, al kongreso mi iras. Sed permesu, ke mi sidigu, ke mi ripozu ĉe vi, ĉar mi estas mortelaca.“

Ne atendinte mian inviton li sidigis kaj apogis sian kapon sur la manoj. Mi ne kuraĝis lin ĝeni. Ĉu mi prezentu al li regalon? Sed fantomo certe ne bezonas tion. Pasis tiel kelkaj minutoj. Fine li levigis la kapon, purigis la okulvitrojn, rigardis min longatempe kaj diris:

„Stranga nomo, kiun vi havas.“

„Vi scias mian nomon?“

„Ne malfacile tion ekscii, vi ja pendigis sufiĉe grandan nomildon ĉe via dompordo: „Kristiano Mallerta, Esperantisto.“ Preterflugante vian domon mi legis la ŝildon. Ĉi tie loĝas certe fervora Esperantisto, mi pensis, mi vizitos lin kaj ripozos ĉe li. Muroj kaj pordoj por fantomo ne ekzistas, kaj jen mi estas. Se vi volas, ni babilu.“

Kredeble mi estis iomete ekscitita, ĉar li daŭrigis:

„Vi eble min timas?“

„Tute ne, Majstro, mi estas tute malplentima, ne, ne, plenma... timalplena.“

„Sentima... mi simple diras.“ li ridetante korektis.

Nun mi deziras nur suprajn tuŝi niajn plej urgajn bezonojn. Nia movado lastatempe sufiĉe bone progresas inter skoltoj, tial ni devas prepari taŭgan literaturon por junularo (R. Kipling, K. May, C. Flammarion ktp.). El ĉefverkoj de naciaj literaturoj ni devas aperigi en unua vico la verkojn nefacile atingeblajn de eŭropa kulturo, kiuj vekus la grandan intereson ekster niaj landoj; ekz. la literaturoj: araba, hinda, ĥina, japana ktp. — Tre grava afero estas eldoni la ĉefverkojn de iamaj internaciaj lingvoj (latina kaj greka) kun samtempa traduko de la plej eminentaj komentarioj. Ni povus komenci ankaŭ la Esp. tradukon kaj eldonon de l' biblioteko de Nobel-premiitoj. Ĝenerale ni devas aperigi la verkojn, kies enhavo garantias la daŭron de illa vivo, aŭ la aktualeco — la baldaŭan disvendon. Pro tio, ĉar la tekniko tro progresas kaj nia ĝisnuna aĉetpovo por specialaj verkoj estas tre malgranda, eldono de tiuspecaj verkoj ne estas provizore rekomendinda. Alivorte, ni ankoraŭ ne kuraĝu komerci, kalkulante je la tuj konsumo. Tamen tre gravas la teknikaj vortaroj kaj diversaj fakaj enciklopedietaj, kiuj povus bonege servi eĉ ne-Esperantistojn kaj samtempe esti bonaj informiloj por ne-specialistoj. Pro supre diritaj kaŭzoj, la verkoj traktantaj sociajn, ekonomiajn kaj filozofiajn problemojn devas esti preferataj al verkoj teknikaj. Eldono de nacilingva por-Esperanta literaturo: vortaroj, lerniloj, propagandaj broŝuroj ktp. devas esti kiel ĝis nun lasita al lokaj iniciatoj kaj plenumo.

Nun mi deziras esprimi mian opinion pri originala Esp. verkado.

Per kreo de originala internacia literaturo ni tute ne minacas la ekziston de literaturoj naciaj. La integrado kaj diferencio en socialprocezoj koordinas, pro tio eblas paralela disvolvado de internacia kaj de naciaj lingvoj. Samtempe evoluas la individuo kaj la socio. Rilate al nia movado la tuta nacio povas esti rigardata iafaje kiel individuo.

Esperanto ne estas kreita sole por nia generacio kaj ĝiaj postuloj. Ni ne povas fermi la pordon de la originala verkado kaj skribi sur ĝin: „Tabu!“ — Krome... jam nun tradukante la nacilingvajn verkojn, ni ofte aperas embarason pro foresto de serĉataj ekvivalentoj, ĉar mankas ankoraŭ io, kion povas doni nur tute libera vivo kaj evoluo. Tradukado sendube potence progresigas la disvolvado de nia lingvopovo, tamen ni konsentu, ke alle laboras cerbo alnajiĝita al fremda teksto kaj alle, se ĝi senpere kreas lingvajn simbolojn de la ideoj. En unua okazo agas precipe konscio, en alia subkonscio.

Nia lingvo devas taŭgi al venontaj generacioj por ĉiuspecaj servoj en internaciaj rilatoj, por scienco, por arto, politiko, komerco, moralo, sporto ktp., ktp. — Ĉu ni eble scipovas difini la limojn, ĝis kiuj devas evolui nia lingvo, klajn kolorojn kaj nuancojn ĝi ne devas uzi?

Nu, la afero povas ja kriziĝi, mi pensis. Esperable de nun li uzos mian nacian lingvon, kiun li certe scipovas, sed...

„Ĉu vi ne amas mian lingvon?“ li demandis, kvazaŭ divenante mian penson.

„Treege,“ mi cerligis, „ĝi estas tre bela, tre taŭgula kaj tre malfacila.“

„Taŭga“ sufiĉas kaj ‚facila‘; ‚difacila‘ ne ekzistas en Esperanto. Por kio vi uzas ĝin, pro kio vi lernis ĝin?“

„Mi uzas ĝin... mi lernis ĝin... nu... mi korespondas Esperante.“

„Pri kiuj temoj?“

„Temoj? Pri temoj mi ne korespondas, mi nur kolektas poŝkartojn, poŝtmarkojn kaj Esperanto-sigelmorkojn.“

„? ? Li ne respondis.“

„Ĉu vi deziras rigardi miajn albumojn kaj...?“

„Lasu, sinjoro, tio ne interesas min.“

„Sed el ĉiuj landoj mi havas kartojn kaj markojn, eĉ tre maloftajn.“

„Certe vi multon lernas per ĉi tiu korespondado?“

„Tion mi ne povas aserti, sed mi elspezas multe da mono por tio.“

„Ĉu vi ne povus uzi pli bone tiun monon por aliaj celoj? Kion vi faris ĝis nun por Esperanto?“

„Mi... mi, nu, mi portas mian stelon kaj rakontas ĉe, ke mi estas Esperantisto, mi fond... fondig...“

„Fondis,“ li afable helpis.

„Mi fondis kelkajn grupojn kaj vizitas ĉiujn kongresojn, kiuj koncernas de mia profesio.“

„Koncernas mian profesion“, la frazo bezonas la akuzativon. Mi konsilas al vi: antaŭ ol fondi grupojn, lernu la lingvon. Mi vidas, ke mi eraris, prijuĝante la bravecon de l' Esperantistoj laŭ la grandeco de iliaj ŝildoj kaj steloj. Sed eble mi ĝenas vin, eble via edzino maltrankviliĝas.“

Mi opinias, ke originala verkado tute ne estas superflua, ĝi nepre pliperfektigos, plisubtiligos nian lingvon.

Ni ĉiuj scias, ke por formi Esperanton sufiĝis multaj lingvoj; ĝi, unuavide tre simpla, tamen enhavas en reduktita formo la plej komplikajn formojn, dum multaj jarcentoj plej fantazie evoluintaj en naciaj lingvoj. Tiu simpleco de l' gramatikaj kaj koncizigo de l' vortaro, kiu genie unuigis kaj ordigis la lingvan aparaton, naskis tamen siaspecajn malfacilaĵojn, kiuj aperas nur post sufiĉe intima konatiĝo. Per tiu admirinde simpla aparato ni devas kaj ni povas manipuli, kvazaŭ al nia dispono estus liverita plej komplika maŝino, kies diversaj eretoj ĉiam estas pretaj servi nin en plej variaj cirkonstancoj. Sekreto de bona manipulado per simpla instrumento konsistas en perfekta tekniko, kiu siavice estas akirata per ekzercado.

Ni venkos, kiam ni konvinkos la mondon. Plej konvinkaj estas la faktoj. En lingva afero la fakto — estas la literaturo; kaj tamen ni devas sincere diri pri nia literaturo, ke ĝis nun ĝi nur embrias. Pro tio ĉiuj konforme al siaj fortoj kaj ebloj ni devas por ĝi labori. Ni devas ĝin krei. Ni devas montri al la tuta mondo la subtilan spiriton de nia lingvo en bela kaj alloga korpo, por ĉies admiro kaj amo.

Kaj ni ne forgesu, samideanoj, ke ni nepre devas fondi nian propran grandan libroeldonejon.

M. Kalina.

Sporto kaj Esperanto.

Oni eble miras vidante ĉi tiujn du ŝajne tiel malsamajn ideojn kunĝitaj. Kion celas sporto? Ĝi volas ĉiurimede sanigi, fortigi kaj beligi la korpon de ĉiuj homoj, junaj kaj maljunaj. Ĉio alia: konkuroj, rekordoj ktp. estas nur eĉkaj propagandaj iloj por venki la homan indiferentecon. Efektive sporto ne nur evoluigas la korpon, sed ankaŭ plurne pure spiritaĵojn, kiel volo, atento ktp. kaj ankaŭ

fortigas la socian senton, nune tiel gravan.

Esperanto siavice prezentas facile uzeblan ilon por komunikigado inter ĉiuj popoloj de l' tergloba, la internacian helpan lingvon. Sed la interna ideo de Esperanto havas ankoraŭ plian celon, nome tiel plibonigi la homojn, ilin fratigi. Nur kune ĉi tiuj du belegaĵoj povas rezultigi la multe preparollitan, sed tamen malofte efektiviĝintan idealon de homa evoluo: „mens sana in corpore sano“.

Sed ni ĉefe pritraktu la realan flankon de l' afero. Kiel povas sporto utiligi Esperanton? La sportaj organizoj: internaciaj kaj landaj asocioj, eĉ apartaj societoj nune jam havas tre vigan eksterlandan korespondadon. Ĝi ĉefe okazas en ĉi tiu el la lingvoj angla, franca kaj germana. Sed tio kaŭzas gravajn malfacilaĵojn precipe por la malgrandaj nacioj, kiuj tamen ofte estas eminentaj sportnacioj, ekz. la nordaj landoj. Ankaŭ la tradukistoj ĝenerale ne konas la specialan sportan

terminaron kaj ofte kaŭzas miskomprenon. Ankoraŭ pli necesa estas Esperanto dum la internaciaj sportkongresoj. Nune oni ne povas sendi la plej kompetentan personon kiel reprezentanton, sed la plej lingvosperanta, aŭ oni devas sendi specialan interpretiston, kio nature fariĝas kara.

La sportantoj mem profitus la plej multe de Esperanto, ĉar ili ĝenerale ne estas lingvosperantaj, sed tamen tre multe vojaĝadas. Foje ekz. okazis al eminenta finna sportanto, ke li dum du-tri tagoj vagadis en fremda urbo ne trovante la sportejon kaj preskaŭ malfruigis je konkuro. Por eviti tiajn okazojn oni estas devigata sendi specialan interpretiston. Tio tamen malpliigas la nombron de la sendotaj sportantoj, ĉar la nomrimedoj ja estas limigitaj. Kaj tamen la sportantoj ne povas interparoli kun siaj konkurantoj pri siaj spertoj ĉe ekzercado, konkuroj vojaĝo ktp., kiel okazus se ili scius Esperanton. La delegitoj de Universala Esperanto Asocio verŝajne ankaŭ donus sian helpon al la vojaĝantaj sportantoj, kiuj kompreneble devus esti ĝiaj ano.

Sed ankaŭ Esperanto povas profiti je sporto, kiu nune jam estas tre grava movado. Ĉie en la mondo la registaroj ĝin subtenas. La sportaj organizoj enalkulas keldekmlajn da membroj kaj havas multnombrajn konkerajn gazeton. La nombro de la regulaj konkurvizitantoj certe superas centmilon. Kian vastegan kaj fruktoportan agadkampon prezentas sporto por Esperanto? Se ekz. en la olimpiaj ludoj kaj ĉiuj grandaj internaciaj konkuroj Esperanto estus uzata, tio certe estas tre granda venko por ĝi.

Tamen se la Esperantistoj volas gajni la sportanojn por sia ideo ili unue mem devas montri sian simpatian kun sporto. Estas efektive mirinde, ke ĉi tiu paralela ideo, kiel sporto estas preskaŭ tute nekonata al la Esperantistaro. Vane oni serĉas artikolojn eĉ sciigojn pri ĝi en la Esperantista gazeto. La solan escepton faras la ankaŭ celere bona Esperanta Finnlando. La aliaj gazetoj, precipe la internaciaj, sekvu ĝian ekzemplon. Estas ja nia devo ĉiurimede subteni kaj prosperigi la du belajn ideojn. *Kiuj kune formas harmonian tutecon.*

Yrjö Ojander.

La unua Dumviva Abonanto de ET: D-ro M. Blassberg en Kraków, Pollando.



La unua Dumviva Abonanto de ET: D-ro M. Blassberg en Kraków, Pollando.

koran dankon ni ŝuldas al tiuj, kiuj pruvis sian konfidon jam antaŭ ol vidi gravajn sukcesojn. Ni celas la ĝesemideanojn, kiujn ni en la Centa jam povis ĉi tiel dumvivajn abonantojn. En malfacila tempo, en kiu pligrandigo de nia presejo kaj samtempa kresko de ĉiuj kostoj kaŭzis al ni financajn zorgojn, ili helpis nin per rapida decido. Kiel unuan ni montras hodiaŭ D-ro M. Blassberg el Kraków.

Oni eble miras vidante ĉi tiujn du ŝajne tiel malsamajn ideojn kunĝitaj. Kion celas sporto? Ĝi volas ĉiurimede sanigi, fortigi kaj beligi la korpon de ĉiuj homoj, junaj kaj maljunaj. Ĉio alia: konkuroj, rekordoj ktp. estas nur eĉkaj propagandaj iloj por venki la homan indiferentecon. Efektive sporto ne nur evoluigas la korpon, sed ankaŭ plurne pure spiritaĵojn, kiel volo, atento ktp. kaj ankaŭ fortigas la socian senton, nune tiel gravan.

Esperanto siavice prezentas facile uzeblan ilon por komunikigado inter ĉiuj popoloj de l' tergloba, la internacian helpan lingvon. Sed la interna ideo de Esperanto havas ankoraŭ plian celon, nome tiel plibonigi la homojn, ilin fratigi. Nur kune ĉi tiuj du belegaĵoj povas rezultigi la multe preparollitan, sed tamen malofte efektiviĝintan idealon de homa evoluo: „mens sana in corpore sano“.

Sed ni ĉefe pritraktu la realan flankon de l' afero. Kiel povas sporto utiligi Esperanton? La sportaj organizoj: internaciaj kaj landaj asocioj, eĉ apartaj societoj nune jam havas tre vigan eksterlandan korespondadon. Ĝi ĉefe okazas en ĉi tiu el la lingvoj angla, franca kaj germana. Sed tio kaŭzas gravajn malfacilaĵojn precipe por la malgrandaj nacioj, kiuj tamen ofte estas eminentaj sportnacioj, ekz. la nordaj landoj. Ankaŭ la tradukistoj ĝenerale ne konas la specialan sportan

terminaron kaj ofte kaŭzas miskomprenon. Ankoraŭ pli necesa estas Esperanto dum la internaciaj sportkongresoj. Nune oni ne povas sendi la plej kompetentan personon kiel reprezentanton, sed la plej lingvosperanta, aŭ oni devas sendi specialan interpretiston, kio nature fariĝas kara.

La sportantoj mem profitus la plej multe de Esperanto, ĉar ili ĝenerale ne estas lingvosperantaj, sed tamen tre multe vojaĝadas. Foje ekz. okazis al eminenta finna sportanto, ke li dum du-tri tagoj vagadis en fremda urbo ne trovante la sportejon kaj preskaŭ malfruigis je konkuro. Por eviti tiajn okazojn oni estas devigata sendi specialan interpretiston. Tio tamen malpliigas la nombron de la sendotaj sportantoj, ĉar la nomrimedoj ja estas limigitaj. Kaj tamen la sportantoj ne povas interparoli kun siaj konkurantoj pri siaj spertoj ĉe ekzercado, konkuroj vojaĝo ktp., kiel okazus se ili scius Esperanton. La delegitoj de Universala Esperanto Asocio verŝajne ankaŭ donus sian helpon al la vojaĝantaj sportantoj, kiuj kompreneble devus esti ĝiaj ano.

Sed ankaŭ Esperanto povas profiti je sporto, kiu nune jam estas tre grava movado. Ĉie en la mondo la registaroj ĝin subtenas. La sportaj organizoj enalkulas keldekmlajn da membroj kaj havas multnombrajn konkerajn gazeton. La nombro de la regulaj konkurvizitantoj certe superas centmilon. Kian vastegan kaj fruktoportan agadkampon prezentas sporto por Esperanto? Se ekz. en la olimpiaj ludoj kaj ĉiuj grandaj internaciaj konkuroj Esperanto estus uzata, tio certe estas tre granda venko por ĝi.

Tamen se la Esperantistoj volas gajni la sportanojn por sia ideo ili unue mem devas montri sian simpatian kun sporto. Estas efektive mirinde, ke ĉi tiu paralela ideo, kiel sporto estas preskaŭ tute nekonata al la Esperantistaro. Vane oni serĉas artikolojn eĉ sciigojn pri ĝi en la Esperantista gazeto. La solan escepton faras la ankaŭ celere bona Esperanta Finnlando. La aliaj gazetoj, precipe la internaciaj, sekvu ĝian ekzemplon. Estas ja nia devo ĉiurimede subteni kaj prosperigi la du belajn ideojn. *Kiuj kune formas harmonian tutecon.*

Yrjö Ojander.

Vii-a Itala Kongreso.

Bonege organizita kaj sufiĉe vizitita estis la 7-a kongreso de Itala Esperantistoj, kiu okazis 20.—21. sept. en Trieste. Ĉeestis ĉirkaŭ 150 partoprenantoj, kaj per regulaj rajtigiloj estis reprezentitaj 1700 el la 1800 anoj de Itala Esp. Federacio.

La registro por Julia Venetio, komisiita de la ŝtata registaro ĝin reprezenti, sendis kiel reprezentanton kom. prof. Lizier. Ĉeestis ankaŭ por la urbestro la ĉefo de instrua fakto en komunumo s-o Du Ban, la direktoro de poŝta departemento kom. Pascoli, la prezidento de Komitato Cembro kom. Venezian. Telegramojn sendis interalie deputato De Giovanni kaj unu ministro. Diversaj komunumoj kaj komercaj ĉambroj estis sendintaj delegitojn.

Sub prezido de ĝeneralo ing. di Montezemolo dum unua tago oni preparolis la organizan demandon. Fine la sidejo de Itala Esp. Federacio estis konfirmata en Verona. Kiel prezidanto estis elektita nia agema kaj ŝatata samideano adv. Vaona, kiel sekretario D-ro Toschi kaj kiel kassisto s-o Reni. Apud tiu gvidantaro efektive oni decidis la starigon de konsilantaro, kies membrojn oni elektos laŭproportio el la diversaj regnaj regionoj.

La federacio agos sur la bazoj de la pasintaj jaroj: plej larĝa aŭtonomio de la lokaj grupoj kaj iniciativo, agado nur de reprezentado, resumigo kaj statistiko de la nacia movado, preparo de propagandiloj ktp.

Gravaj estis la temoj de la dua tago, raportataj de Grafo Rinaldi, D-ro Toschi kaj Prof.

kiun mia cigaro estis enbruliginta. Mia edzino ankoraŭ longe insultis pro mia malatento, sed mi preskaŭ ne aŭskultis ŝin, mia animo estis tro plena je la plendoj de nia malfeliĉa Majstro.

Ĝis reskribo mi restas via

Kristiano Mallerta.

Mia kanto.

Al s-o Jan Kosteki.

I.

Dum unuaj matenruĝaj briloj, Akompane per la birdo-triloj, Tra kamparoj, tra diversaj maroj Flugis kanto mia antaŭ jaroj.

Flugis kanto kaj el supre vidis, Kiel nuboj tra ĉiel' rapidis, Kiel ora suna lum' aŭrora Teron kovris per majesto glora.

Aŭdis kanto de kamparoj bruon, Ĉe marbordoj de la ondoj skuon, Kiel sola, ĉe l' river' izola Ploras ĉiam la betulo pola.

II.

Agle flugis al ĉiel' proksima Mia kanto en la spac' senlima, Dum tra tero, de tempest' infero Fajre brulis, sangigadis fero.

Dividita per la lim' kordona Ĝi pereis en brueg' kanona, En giganta forto batalanta Eksilentis kanto Esperanta.

Nun revenis ĝi el vastaj sferoj Kaj denove plena je esperoj, Ĝi eksonas de inspir' burĝonas Kaj per gloro Esperanton kronas.

Eska.

Piatti. La unua, delegito de Padova Komerca Cambro, parolis pri „Esperanto kaj komerco“ kaj akcentis sian koncepton, ke tiu komerco „tranĉeo“ estas la plej atakinda de niaj samcelanaj regimontoj. Venki tiun armeon signifas samtempe krei al si la plej eble fortikan apoganton por posta batalo kaj definitiva venko. D-ro Toschi raportis pri gazetaro kaj Esp. Pro manko de tempo li diris nur kelkajn vortojn kaj prezentis deziresprimon rilate Esperantismon kaj ne-Esperantan gazetaron unuvoĉe aprobitan. Prof. Piatti, del. de komunumo Milano, raportis pri Esp. en lernejoj. Oni sendis telegramon al komandanto Alessio kaj al D-ro Filippetti, kiuj bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kongreson. Oni decidis aranĝi la proksiman kongreson en 1923 en Terni en centra Italujo.

Plej koran dankon meritas la Trieste'a organizintaro kaj ilia estro kaj animo D-ro A. Ghez por la bona preparo de akcepto, amuzaj kaj kunvenoj ktp. en la mirinda urbo ĉe la blua Adriatiko. (to)

Danko de Rusaj Malsatantoj.

En Ĥersono preskaŭ duono de loĝantoj jam mortis pro malsato. Ni Esperantistoj havis socion kun 500 anoj kaj nun iuj el ili estas mortintaj kaj plejmulto forkuris... Restis nur 18—20 personoj.

Mi, vizitinte Moskvon, kun granda ĝojo kaj danko ricevis de Centra Komitato de S. E. U. 36 milionojn da rubloj kaj aĉetis tri pudojn da faruno por malfeliĉaj Ĥersonanoj. Nun ni dank' al Esperantistoj havas eblecon daŭrigi nian vivon, kvankam por la tempo. Permesu esprimi koregan dankon al ĉiuj bonkoraj samideanoj kaj ankaŭ al la eldonejo de „Esperanto Triumfonta“ kaj peti vin pri daŭrigo de la urĝe necesa helpo.

Ĥersono, 6. 9. 1922.

M. Genkin,
Sekretario de Ĥersona Esp. Societo.

Federacio de Esp. Societoj en Polujo.

II. Komunikoj.

Por inviti la XV-an Internacian Esperanto-Kongreson al Varsovio en 1923 j., la Federacio sukcesis atingi la interesigon pri la kongreso en Varsovio de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, kiu donis oficiale sian promeson subteni la kongreson en 1923 j. kaj fari al la kongresanoj faciligojn koncerne fervojajn, pasportajn kaj loĝeajn demandojn.

Por inviti la Dekkvinan al Varsovio en 1923 j., la Federacio delegis oficiale s-on D-ron Emiljan Loth, membron de Pola Esperantista Societo, kiu en la provinca per: 1. oficiale invito de la Federacio por 1923 j. al Varsovio; 2. kopio de la oficiala skribaĵo de la Ministerio por Internaj Aferoj pri la kongreso; 3. persona rajtigilo; 4. motivigita invito, direktita al la prezidanto de K. K. K., s-o Warden; 5. telegrafa komunikoj de la prezidanto de Pola Esperantista Societo, prof. D-ro O. Bujwid, pri la solidareco de tiu ĉi societo kun decidoj de la Federacio koncerne la inviton de la XV-a Internacia Esp. Kongreso al Varsovio en 1923 j.

Krom tio la Federacio sendis la samajn invitojn (kun detalaj motivoj) al generalo Sebent. (En la oficiala kongreslibro de Helsinko estas sur paĝo 82 menciita la teksto de l' invito de Varsovio por 1923 j.)

La estraro de la Federacio de Esperantistaj Societoj en Polujo devas kun granda indigno komuniki, ke ĉiuj decidoj kaj komisioj koncerne la inviton de la XV. Int. Esp. Kongreso al Varsovio en 1923 j. estis malĝuste interpretitaj. Tia-

Muziko.

La Aŭtonoma Muziknotado.

La ordinara muzikskribo, kiu devenas, pro multjarcenta evoluo, de la mezepokaj „neŭmoj“, havas grandajn bonojn. Sed ĝuste pro tiu longa evoluo restis en ĝi diversaj nelogikaj forigotaj. La ĉefaj bonoj estas la uzo de la liniaro, de la notoj, de la paŭzoj, de la notnomoj kc. La malbonaĵoj estas ĉefe la sekvantaj: 1. montrado de 12 efektive diversaj kaj sendependaj duonaj tonoj de temperata gamo, per 31 signoj, pro la motivo ke ĉiu diatona noto estas montrinda du-, eĉ trimaniere (ekz.: *do=si* (kun diezo=*re bb*), 2. la uzo de diversaj kleoj, pro kio unu kaj sama sono estas lokita alie, laŭ la uzata kleo; 3. la samnomoj notoj ne havas la saman staron en la diversaj oktavo, eĉ ĉe la uzo de unu kaj sama kleo, 4. la tri nun ankoraŭ uzataj kleoj ne sufiĉas por montri ĉiujn sonojn uzatajn en la moderna muziko; efektive, malsupre de *fa* sub la liniaro en *fa*-kleo ekzistas 2 1/2 oktavo; kaj supre de *sol* supre de la liniaro en *sol*-kleo staras ankoraŭ 3 1/2 oktavo; 5. la uzo de diezoj, bemoloj kaj bekaroj fariĝas ĉiam pli ĝenananta en la nuntempa muziko: tiuj signoj devus malaperi; 6. la diverseco de notvaloro kiel tempunuo; krom tio la montrado de la takto, de la paŭzoj, kaj eĉ la liniaro estas plimplygeblaj.

Jam de pli ol du jarcentoj aro da muzikscienculoj provis plibonigi la muzikskribon. Sed prekaŭ neniu el ili komprenis la veran karakteron de la problemoj: pli ol 300 sistemoj estas proponitaj, preskaŭ ĉiuj estas stranganĝaj, absurdaj kaj nepraktikeblaj proponaĵoj. Nur kelkaj el la proponitaj sistemoj enhavas partajn bonojn, kies kunigo en unu tuto povus doni la solvon. Inter ĉi tiuj lastaj estas citindaj tiuj de Bolgelou (18-a jc.),

kaŭze la XIV-a Kongreso en Helsinko, malbone informita pri la invito, decidis, ke la XV-a ne okazu en Varsovio, kvankam la Varsovia delegito estis komisiita inviti la Dekkvinan al Varsovio ne nur en la nomo de la Federacio, sed ankaŭ laŭ unuvoĉa decido de l' Unua Tutpola Esperanto-Kongreso, sekve laŭ deziro de la tuta pola samideanaro.

Tiom pli ni deziris gastigi la XV-an Esp. Kongreson en Varsovio, ĉar laŭ asertoj de la Loka Monumenta Komitato en 1923 j. ne en 1924, kiel la kongreso en Helsinko estis informita, okazos la solena malkovro de l' monumento al nia Majstro, kies ceremonion la tutmonda samideanaro treege deziras partopreni.

La Federacio post la transdono de la statuto al la Ministerio de Internaj Aferoj por legalizo, konsideras, ke ĝi havas ankoraŭ multon por prilabori; la lojalaj kaj aktiva kunhelpo de ĉiuj niaj polaj societoj estas necesa, kaj tiam ni kredu, „Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal“, „Nek ies perfidoj subitaj.“

Varsovio, en septembro 1922.

Dr. Paulina Muszkatblat,
ĝenerala sekretariino
de Fed. de Esp. Soc. en Polujo.

Literaturaj Konkursoj

de Brita Literatura kaj Debata Societo.

Jam dum tri antaŭaj jaroj la Brita Literatura kaj Debata Asocio aranĝis similajn konkursojn, kaj ili sendube estis sukcesaj, ĉar partoprenis sufiĉe da personoj. La premioj ja estas valoraj precipe por malbonvalutuloj, kaj por ebligi al tiuj partopreni en la konkursoj de 1922/23, oni ĉi tiun fojon ne postulas „enirpagon“ kiel antaŭe. Jen la kondiĉoj:

1. Traduko de Angla Proza Literaturajo, de 2000 ĝis 3000 vortoj. 1-a premio 30 ŝ.; 2-a premio 20 ŝ.
2. Originala Novelo, de 1000 ĝis 2000 vortoj. 1-a premio 30 ŝ.; 2-a premio 20 ŝ.;
3. Originala Poemo, ne pli ol cent linioj. Premio 15 ŝ.
4. Traduko de Angla Poemo, ne pli ol cent linioj. Premio 15 ŝ.

Kondiĉoj:

1. Konkursantoj devas alpreni pseŭdonimon, kaj skribi ĝin sur la manuskripton. Ili devas skribi la nomon kaj adreson — kune kun pseŭdonimo — sur apartan folion kaj enmeti ĝin en koverton, sigelante ĝin kaj skribante la pseŭdonimon ekstere. Tiun koverton ili devas sendi kun la manuskripto.
2. Ĉiuj manuskriptoj fariĝos la propraĵo de la B. L. k. D. S. La Komitato de B. L. k. D. S. rezervas al si ĉiujn rajtojn pri publikigo de manuskriptoj.
3. La Komitato de B. L. k. D. S. rezervas al si la rajton, aŭ ne doni, aŭ dividi, iun ajn premion. Se manuskriptoj de sufiĉa merito estos ricevitaj, medalo aŭ medaloj estos ankaŭ aljuĝitaj.
4. Manuskriptoj devas atingi la sekretarion, s-on Charles H. Edmonds, 19 Delfcott Road, Welwyn Garden City, Anglujo, antaŭ 28. februaro 1923.

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Esperantotago en Marseille

okazis 24. septembro. Matene oni laboris, posttagmeze kaj nokte oni promenis. Oni preparolis projekton de Federacio grupigonta la Esp. klubojn de la Mediteranea marbordo kaj revkonta la ankoraŭ dormantajn grupojn. Ĉeestis gesamideanoj el Alger, Arles, Béziers, Cannes, Cete, Mirebel, Montpellier, Toulon, Toulouse, Vienne kaj Vitrolles.

kiu sendependigis la 12 duonajn tonojn de la temperata gamo; tiu de Fourier, kiu uzas nur trilinean liniaron; kaj tiu de s-o Ch. Meerens, kies aŭtoro havis la ideon numeri la oktavojn.

Dank' al sia klereco kaj kritikemo, s-o Jean Hautstont, la eltrovinto de la Aŭtonoma Muziknotado, sukcesis kunfandi en unu sistemo la bonojn de la ordinara muzikskribo kaj de la ĵus cititaj provoj kaj tiamaniere realigis fine la veran solvon de la problemoj.

Ĝi konsistas el jeno:

La 12 duonaj tonoj sendependigitaj ricevis la sekvantajn nomojn: *do de re me mi fa fo sol sa la li si*, t. e. ke la nomoj de la „diatonaj“ notoj estas konservitaj kaj ke la kvin ceteraj notoj ricevis nomon kunmetitan el la konsonanto de la antaŭiranta diatona noto kaj el la vokalo de la sekvanta, escepte la noto inter *re* kaj *mi*, kiu pro belsoneco kaj kantofacileco estas nomita *me* anstataŭ *ri*.

Tiuj 12 notoj estas lokitaj sur trilinea liniaro: *re, fo, li* staras vice sur la 1-a, 2-a kaj 3-a linio; *de, fa, la* pendas vice al la 1-a, 2-a kaj 3-a linio; *me, sol, si* kuŝas vice sur la 1-a, 2-a kaj 3-a linio; *do* staras sub la 1-a linio, ne tuŝante ĝin; *mi* kaj *fa* staras inter la 1-a kaj 2-a, kaj inter la 2-a kaj 3-a linio, ne tuŝante ilin.

La diversaj oktavo, pli ĝuste nomitaj „serioj“, estas numeritaj per arabaj ciferoj. La kvina tamen, tiu kiu enhavas la *la* de l' diapazono, estas ordinare montrita per roma cifero: V.

La notoj havas formon mgidalan. La „nigra noto“, la ununura tempunueca valoro, estas montrita per „nigra mgidalo“ sen vosto. La „kroĉo“ havas la formon de nigra mgidalo kun vosto (do kiel la „nigra noto“ de l' ordinara muzikskribo); la „duobla kroĉo“ tiun de la ordinara kroĉo, ktp.

15-a Kongreso de

Esp. Asocio de Norda Ameriko.

Per „An.erika Esperantisto“ ni sciigis pri tiu okazinta kongreso (en Toronto, 11.—15. julio), pri kiu ni ne raportas, ĉar ĝi jam malaktualiĝis. Ni esperas, ke en venonta jaro unu el niaj nord-amerikaj legantoj sendos al ni ĝustatempe raporton pri la nordamerika XVI-a.

Helpo al malsatantaj rusaj samideanoj.

Pere de nia Abonejo en Moskvon (s-o Valentinov) ni sendis 6000000 rublojn al malsatantaj samideanoj en Samara: Treŝalin, Vernitovskij, Gubin, Ivanov kaj Nazarov. (Poŝtkvitanco 494.) Pluaj sendaĵoj estos regule sciigataj.

Nia Abonejo petas nin averti, ke oni ne sendu subienon al s-o Kovalev (aŭ Korvaleff) en Rostov (vidu ET 93), ĉar li ne estas Esperantisto kaj antaŭ kelkaj jaroj propagandis novan lingvon „Adelfenzal“. S-o Akkerman en Moskvon, Puŝkinskaja (vidu ET 98) ne ekzistas, ĉar ne ekzistas strato Puŝkinskaja en Moskvon; ŝajne okazis konfuzo inter nomoj kaj stratoj, ĉar s-o Kovalev loĝas en tiu strato en Rostov.

Do de nun ni ne publikigos petojn pri helpo al difinitaj rusaj malsatantoj, sed ĉiuj sin turnu al nia Abonejo. Donacojn akceptas nia Administrujo en Horrem. Pri ĉiuj donacoj ni kvitancos.

Senpaga gvidfolio.

Denove ni atentigas la legantaron, ke la bela ilustrita gvidfolio de banurbo Wiesbaden ankoraŭ estas ricevebla senpage. Sribu poŝtkarton al Städtisches Verkehrs-Bureau en Wiesbaden (Germ.).

Esperanto en la popollernejoj de Dresden.

La aranĝo de Esp. kursoj en la popolaj lernejoj de Dresden havis la sukceson, ke anoncis sin ĉ. 1200 dekunu- ĝis dektrijaraj infanoj, kiujn oni nun instruos en 36 kursoj en la diversaj popollernejoj de la urbo.

Laŭ la decido de la portlerneja oficejo Dresden (Schulamts Dresden) Esperantoinstruado estos lerneja fako, kaj la koncernaj instruoroj estos enĉalkulataj en la devigaj horoj de la geinstruistoj. Por la geknaboj de la 7. kaj 8. lernjaroj estos Esperanto laŭvola fako kiel ankaŭ stenografo. Tiu ĉi decido validos deponat Pasko 1923.

Internacia Kontraŭmilita Ekspozicio

okazos en Amsterdam komence de decembro. Por montri la praktikan valoron de Esperanto, oni petas alsendon de Esperantaj kaj nacilingvaj kontraŭmilitaj eldonaĵoj (gazetoj, folieto, bildoj, libroj, glumarkoj ktp.) al Ned. Laborista Esperanto Servo, Alleeweg 9, Enschede, Holland.

Alvoko al ĉiuj kristanaj gesamideanoj!

La Tutmonda Komitato de la Kristana Asocio de Junaj Viroj (K. A. J. V. — angle: Y. M. C. A.) nun tiel bone favoris Esperanton, ke ĝi je la unua fojo sendis oficialan delegiton al la kristana faka kunsido dum la XIV-a Kongreso de Esperanto en Helsinko. De la Kristana Esperantista Ligo (K. E. L.) kuraĝas plivastigi la propagadon inter aliaj internaciaj kristanaj organizoj, kaj ĝi petas ĉiujn kunkristanojn rapide helpi per sendo de iliaj propagandoproponoj kaj malsubtenoj al s-ro P. Hübner, Bergstrato 1a, Quedlinburg, Germanlando. Tie ĉi oni donos ĉiujn necesajn informojn.

Nova fervojista Esperanto-Asocio.

Post la tria fervojista fakkunsido dum nia XIV-a kelkaj finnlandaj fervojistoj kunvenis por preparoli la fondon de propra Esp. Asocio. Oni decidis fondi la asocion kaj nomi ĝin „Esperanto-Asocio de Finnlandaj Fervojistoj“. Kiel prezidanto estis elektita s-o H. Salokannel, Laihia, kaj sekretario s-o H. Lillqvist, Helsinko. La asocio komencas kolekti membrojn per specialaj listoj, sendotaj al ĉiuj stacioj. Venontan printempon okazos kunveno de la asocio, kaj tiam oni fikso la regularon kaj jarkotizojn.

T. A. L.

La ronda kaj blanka notoj estas similaj al tiuj de la ordinara muzikskribo. Sed ĉiuj tiuj notvaloroj estas nomitaj jene:

Ronda noto = la kvarobla
blanka noto = la duobla
nigra noto = la unuo
kroĉo = la duona

la ceteraj, vice = la kvarona, la okona, la deksesona. La paŭzoj havas formon, kiu pli bone rilatas, sekve memorigas, la formon de la respondantaj notoj. La takto estas montrata per arabaj ciferoj (2, 3, 4 kc.), al kiuj estas ligita la formo de „nigra noto“ (la unuo) sekvita de punkto por la ternaraj taktoj, sen punkto por la binaraj.

Tiaj estas la ĉefaj signoj propraj al la Aŭtonoma Muziknotado. Ĝi enhavas la ceterajn signojn de la ordinara muzikskribo, kiel la fermaton, la ripetsignon kc. kc.

Pro sia simpleco kaj plenejo la Aŭtonoma Muziknotado estas skribo samtempe popola kaj arta. Rezultato de profunda kritika pristudado de la meritoj kaj difektoj de la ordinara muzikskribo kaj de la diversaj provoj je plibonigo, ĝi formas logikan pluan evolucio de la unua.

Ĝi ricevis la aprobon de multaj muzikverkistoj kaj scienculoj kaj estas jam senlace propagandata de aro da muzikpraktikantoj en la mondo.

Ni Esperantistoj helpu al tiu disvastigo, ne nur pro la interna merito de tiu bonega sistemo, sed ankaŭ ĉar ĝia aŭtoro, s-o J. Hautstont, estas nia samideano.

Luitpold Bunze.

Rim. de Red.: „Belga Esperantisto“ publikigis broŝurforme pli detalajn priskribojn pri la Aŭtonoma Muziknotado. Ĝi estas havebla ĉe la redakcio de „B. E.“ 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen, kontraŭ sendo de du respondkuponoj.

Märkisch-Pommerscher Esperanto-Verband.

La 16. kaj 17. septembro 1922 okazis en Friedrichshagen apud Berlin la 4-a Distrikta Tago por la provincoj Brandenburg kaj Pommern, dum kiu la „Marka-Pomera Ligo Esperantista“ estis refondita.

Ĉiuj grupoj kaj izolitoj el la provincoj Brandenburg kaj Pommern baldaŭ oficiale aliĝu al la refondita ligo, por ke ankaŭ en la centro de Germanujo la organizo estu simila al tiu de la aliaj germanaj ligoj.

Gaja somerfesto kaj agrabla ekskurso kunigis la multajn partoprenantojn. La propaganda vespero estis bone vizitita. Ĉeestis reprezentantoj de la urbo kaj de la „Kunsgemeinde“. D-ro Burkhardt bonege parolis pri la temo „La lingvo kiel artaĵo“. Diversaj eksterlandaj Esperantistoj salutis oficiale.

H. N.

Parolejo.

126. Zamenhofa Monumento.

Atestimata sinjoro Redaktoro!
En ET n-o 99, paĝo 5, kol. 1. sub „Zamenhofa Monumento“ troviĝas eraraj informoj; mi do sentas la devon, konsente kun la Loka Komitato korekti:

1. Ke mi ne parolla en la nomo de la Loka Komitato, sed kiel delegito al tiu Komitato de Pola Esperantista Societo.

2. Ke mi ne diris, ke la monumento estos preta post du jaroj, ĉar tio estis korektita de mi en la sekvinta tago dum la legado de la protokolo.

La Loka Monumenta Komitato, en kies kunsido mi hodiaŭ partoprenis la unuan fojon kiel membro, laboras fervore, kaj inter la komitatanoj regas plena interkonsento. Varsovio, 19. 9. 22
Stanislaw Essigman.

127. Esperanto inter kelneroj kaj kondukistoj.

Permesu al mi fari sugeston. Granda stimulado al nia usona Esp. movado fariĝus vasta scipovo de Esperanto inter eŭropaj kelneroj kaj kondukistoj. Tie ĉi je la koro de Usono („la meza okcidento“), oni havas nur etan neceson por helpingo. Oni ne ofte renkontas fremdlandulojn. Sed ekzistas kreskanta deziro vojaĝi Eŭropon. Ofte mi ricevas demandojn, ĉu kelneroj kaj kondukistoj en Eŭropo parolas Esperante. Kiam oni povos honeste lesi tiun ĉi demandon, la Esp. afero en Usono ricevos grandan stimolon. Ĉiu amerikano estas estonta vojaĝanto.

O. W. Fergusson,
Jeffersonville, Ind.

Abonojn kun rabato

por legejoj, kiujn ni donis komence de la ekzistado de ET, ni nun ne plu povas doni, ĉar ni spertis, ke ili malhelpis gajnon de regulaj abonoj inter la samideanoj. Generale ni gajnis kelkajn abonantojn post ĉesigo de propagandabono. Ni sciigas tion responde al diversaj demandoj.

Adm. de ET.

Leterkesto de ET.

Al pagintoj: Harry Busch en Dorpat kaj B. Sirdla en Bakar! Ni ricevis vian pagon; bonvolu sciigi por kio servu la mono! Ankaŭ de aliaj samideanoj ni ricevis monon jam antaŭ monato sed ankoraŭ nenian scigon pri la celo de la mono.

Pagantoj per poŝtĉeko bonvolu ĉiam rimarkigi sur la ĉeka ŝilpeto, por kio estas destinita la mono.

Niajn nepagintajn ŝuldatajn ni petas pri baldaŭ plena plenumo de sia devo, ĉar ni bezonas la monon por pagi niajn liverantojn. Eble vi jam legis, ke la germanaj paperviverantoj postulas de nun antaŭan pagon de 50%.

Al diversaj eldonejoj (H. I. Paulus Eldonejo, Hitt w). — Ni ricevis kelkajn el viaj eldonaĵoj por recenzo. Sed vi sendis nur po unu ekz. de ĉiu eldonaĵo. Por recenzo ni bezonas minimume du ekzemplerojn, kaj — se iuj eldonaĵoj aperis binitaj — ni atendas, ke inter la al ni senditaj ekzempleroj troviĝas minimume unu binita.

Abonantoj kaj anoncantoj. Bonvolu direkti viajn mendoln kaj pagojn aŭ al nia Abonejo en via lando aŭ rekte al ni, sed bonvolu ne intertrifli samtempe kun la Abonejo kaj kun ni, ĉar per tio vi konfuzas la Abonejo kaj nin mem. Do ne sendu, ekzemple, al ni tekston de anonco kaj la pagon por ĝi al la Abonejo, sed sendu la monon kune kun la teksto de l' anonco aŭ al la Abonejo aŭ al nia Administrujo en Horrem.

Al s-o L. M. kaj aliaj. Kvankam la ET-istoj lomete komprenas francan, anglan kaj aliajn lingvojn, tio tamen ne sufiĉas por ĉiukaze Esperantigi fremdlingvajn manuskriptojn. Do bonvolu sendi al ni Esperantigitajn tekstojn, se vi havas intereson je ilia represo.

G. P. de B. en Enschede. Koran dankon por viaj recenzoj!

C. S. 200 gmk por malsatantaj rusoj ni danke ricevis.

Recenzejo.

LIBROJ.

ESPERANTO-LEHRBUCH für Schul-, Kursus- und Selbstunterricht von K. Brüllmann. 148 pg. 11 1/2; 17 1/2 cm. 1922. Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden A 27. Prezo: 120 gmk. —

Nova, bona lernolibro por germanlingvanoj ĵus aperis. La konata aŭtoro intence prilaboris la tutan gramatikon en 45 lecionoj imitante la ekzemplon de D-ro Privat Ĉi tiu metodo de instruo ebligas al ĉiuj lernantoj, precipe al neinstruitoj, pli facilan kaj malpli penigan encerbligon de reguloj, vortoj, finaĵoj ktp., ĉar la instruado postulas tempon pli longedaŭran ol la kutima dekladeciona kurso. Estas evidente, ke la verkinto celis havi lernilon por popollernejoj. Ke li sukcesis, pravas lia verko, kiun ni varme rekomendas al ĉiuj instruistoj. A'donita vortaro sufiĉas por komencantoj. — (G. Ajut.)

GAZETOJ.

Literaturo, aprilo-junio, enhavas i. a. novelon de Emma L. Osmond „La serĉado por la Belo“, kiu ricevis la unuan premion en la konkurso pri originalaj noveloj, aranĝita por 1922 de Brita Literatura kaj Debata Societo. (Atentu la novajn konkursojn en la hodiaŭa numero!) La Revuo Orienta, aprilo, majo kaj junio. Arguso, aŭgusto (organo de meksikaj Esperantistoj). Hungara Esperantisto, sept., kun detala raportoj pri la IV-a Hungarlanda Esp. Kongreso en Miskolc. La Espero, aŭg.-sept. Esperanto-Praktiko, sept., kun interesa priskribo de nia XIV-a Bizancio, julio-aŭgusto. Ido, oktobro. Holanda Esperantisto, 28. sept. La verda ombro, jul.-aŭg.

